



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Simpla : 5 fkoj } Sendotaj al : Micard Henri
 Bonfara : 10 fkoj } Kulturaj kajeroj
 Epineux-le-Seguin (Mayenne)
 C. C. P. Nantes 2349-62
 (Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1963

5

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

..

La vera miraklo de Esperanto (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

El ie en la mondo :

Samarkand (fino) (P. Poliščuk).

Abelkulturo en Svislando (A. Baur).

Scienco por la gejunuloj :

Kio estas atomo ?

Gravaj datrevenoj.

Iom da Historio :

Granda nomo el la Loire-valo (B. Cheverry).

Kio okazis en Gresillon.

Fantaziaĵo :

Ĉe la dentisto (R. Mackay).

Por via distro :

Nia Konkurso.

Gramatiko per Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

La vera miraklo

de Esperanto

Mi estis unu al la 350 francoj, unu el la 3.400 geesperantistoj, kiuj ĉeestis la Universalan Kongreson en Sofio. 3 400 gepartoprenantoj, kiuj kunportis al siaj 45 landoj neforgeseblajn memorarojn. Jam ĉe la limo oni sentis sin « hejme » pro la granda banderolo, kiu deziris « Bonvenon en Bulgario ». En Sofio mem ĉiuj avenuoj, bulvaroj, stratoj kondukantaj al la Ŝtata Universitato, sidejo de la Kongreso, estis ornamitaj per Esperanto-flagoj kaj kongresaj afiŝoj. Restoracioj, trinkejoj, diversaj vendejoj invitis vin per esperantlingvaj skribaĵoj. Je via dispono estis menuoj skribitaj en Esperanto.

Pri la organizado mi nur diros, ke ĝi estis tre bona, se ni konsideras, ke la kelkaj negravaj malfacilaĵoj estis neeviteblaj pro la granda nombro de la kongresanoj kaj, ni devas konfesi, pro la manko de disciplinemo de kelkaj el ili. Pri la programo mi tute ne parolos pro tio, ke vi jam legis ĉiujn detalojn en aliaj revuoj kaj gazetoj. Mia intenco ne estas skribi pri la sukceso de la ISU prelegoj, de la Artoj Vesperoj aŭ de la Akceptado, sed pri alia aspekto de la Kongreso, kaj de la kongresoj ĝenerale : la homa aspekto.

En Universala Kongreso oni ĝojas renkonti amikojn kun kiuj oni konatiĝis okaze de aliaj similaj eventoj (ekzistas samlandanoj, kiuj renkontiĝas nur eksterlande !). Oni ĝojas vidi la homojn, kies nomoj estas multkonataj en la Esperanto-movado aŭ literaturo, kaj oni fieras interŝangi kelkajn banalaĵojn kun ili. Oni ĝuas la prezentadojn de la altnivelaj teatro-trupoj. Oni sentas sin pli kultur-riĉa, kiam oni eliras el salono, en kiu prelegis en perfekta lingvo elstara esperantisto. Resume oni fieras aparteni al Asocio, kiu tiel sukcese organizas internaciajn aranĝojn. Sed ĉu tio konsistigas la nuran celon de Universala Kongreso ? Ĝi estas la plej videbla, la plej impona aspekto, nepre necesa por montri al la ekstera mondo, kio Esperanto estas. Plej necesa ankaŭ por ke la gesamideanoj utiligu siajn lingvokonojn, kontrolu siajn kapablojn, konstatu, ke ili bone komprenas samideanojn el iu ajn lando kaj bone komprenigas sin al ili. Okaze de UK,

arkitekto renkontas arkitekton, instruisto instruiston, kristano kristanon, ŝakludanto ŝakludanton, ktp. Sed ankaŭ homo renkontas homon ; kaj tio estas la vera miraklo de Esperanto.

Dum la Interkona Vespero, ni sidis meze de la tutplena grandega salono de la Universitato. Antaŭ ni, sur la scenejo, kantistoj prezentis sian programon. Dum interakto, viro, kiu de la komenco sidis antaŭ ni, sin turnis kaj demandis ĉu ni konsentas, ke lia filo kaj la nia fariĝu amikoj. Kompreneble ni konsentis kaj ĉe la fino de la Vespero, post kelkminuta babilado ni rendevuis por la morgaŭo. Kaj fakte dimanĉon posttagemeze ni iris kun onklo Vladimir, direktoro de Agrikultura Kooperativo, nevo Vladimir, neŭrologo, kaj Venko, filo de la kuracisto, al Borovec, ripozloko de laboristoj, meze de abioj en la montaro. Dum tiu vojaĝo ni ekkonatiĝis kun la mirinda gastamo de la Bulgaroj, kiuj plenumas viajn dezirojn antaŭ ol vi havis tempon ilin eldiri. Ili ne havis multajn okazojn renkonti alilandanojn. La unuan fojon okazis la Universala Kongreso en ilia lando ; grandioza okazaĵo por ĉiuj sed ĉefe por ili. Ilia granda deziro al amikiĝo fine povis elflui kaj tion ĝi faris plene. Ili multe insistis pri la fakto, ke ni estis gastoj ĉe ili. En ĉiuj okazoj, eĉ la plej etaj, aperis ilian profundan gastamon.

Dum tri tagoj ni multe parolis pri ĉio. Iom post iom ni pli bone konis unu la aliajn. Nun, vi estas en viaj urboj aŭ vilaĝoj sed ni klare imagas vian vivon, kaj ankaŭ la vivon de Dimitar la kamparano de Banskó, kiu tiel emociis parolis pri sia « unua sed verŝajne lasta UK ». Al vi iras niaj plej karaj pensoj. Vi taŭge konkludis « Onklo Vladimir » dirante, ke la diferencoj inter vi kaj ni, malproksimaj popoloj, estas tre malgrandaj, tre malmultaj. Ili ĉiutage fariĝos pli kaj pli malgrandaj kaj malmultaj inter niaj popoloj kaj inter ĉiuj popoloj, kondiĉe, ke ni ne permesu la starigon de novaj obstakloj tute nenaturaj. Dank'al Esperanto ni traboris la muron de nekonno. Per Esperanto ni dissaltigu « la obstajn barojn ».

Pierre BABIN.

Esperanto tra la Mondo



Rekorda Universala Kongreso en Sofio

Pli ol 3 400 personoj el 45 landoj ĉeestis la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto en Sofio. Ili venis el ĉiuj kontinentoj kaj la unuan fojon deŝt la mondmilito alvenis soveta delegacio de 30 esperantistoj kondukita de la moskva lingvisto Prof. Bokarev. Ankaŭ kelkaj afrikaj studentoj ĉeestis. La bulgara poŝto eldonis specialan poŝtmarkon.

La bulgara ĉefministro, S-ro Georgi Trajkov, ĉeestis la inaŭguran kunvenon kaj alparolis la ĉeestantojn. La ministro por instruado mem salutis la edukistojn esperantistajn kaj la bulgaraj radio, televido kaj gazetaro interesiĝis pozitive pri la kongreso. Paralele disvolviĝis la diversaj eroj de la Arta Festivalo, de la Somera Universitato, de la blindaj esperantistoj kaj de la infanoj.

En 1964 la 49-a Universala Kongreso okazos en Hago, Nederlando, de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto, sub la alta protekto de la Reĝino Juliana.

Aliaj someraj kongresoj kaj renkontoj

— La 36-a SAT-Kongreso kunvenigis en Hamburgo ĉirkaŭ 300 anojn el 16 landoj de la 20-a ĝis la 26-a de Julio. Ili interalie vizitis la ŝipon « Esperanto » kaj diversajn laborejojn. La 37-a SAT-Kongreso okazos en Narbonne (Francio).

— La Junulara Kongreso kunigis en Vraca (Bulgario) 540 gejunulojn. Ni notu, ke ekde venonta Januaro aperos nova gazeto por la junularo, « Kontakto » kaj ke du novaj naciaj sekcioj de TEJO estis kreitaj en Belgujo kaj Usono. En 1964 la Junulara Kongreso okazos en Amsterdam, de la 8-a ĝis la 15-a de Aŭgusto.

— Sub la aŭspicioj de la Nacia Unesko-komisiono okazis en Belgrado la Konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata. 260 reprezentantoj el 20 landoj interŝanĝis spertojn kaj adoptis gvidan rezolucion.

— Brila Esperanto-semajno en Helsinko (Danlando) : 87 personoj el 7 landoj ĉeestis.

— Antaŭkongreso en Vieno : pli ol 100 partoprenantoj el 16 landoj.

— La 5-a Baltlanda Tendaro okazis en Es-

tonio fine de Julio. 220 esperantistoj el ĉiuj partoj de Sovet-Unio vizitis ĝin.

— Sucesplenaj periodoj en la Esperantista Kulturdomo, ĉefe la Internaciaj Semajnoj, kun S-ino Major el Londono kaj S-ro Roose el Brugge. Dum la somero, proksimume 300 personoj vizitis la kastelon.

Tokio akproksimiĝas

La partoprenantoj de la 50-a Universala Kongreso en Tokio, en 1965 havos la okazon vidi la No-stilan prezentadon « La Flugrobo » verkitan antaŭ 600 jaroj.

Antaŭ la kongreso eldoniĝos libroforme la « Enciklopedieto de Japanaj Aferoj » de Teruo Mikami, kiu nun aperas felietone en « Oomoto ».

El Eŭropo estos verŝajne eble ekveturi per du specialaj aviadiloj kiuj ekvojaĝos je malsamaj datoj por permesi elekton.

Kelkaj kunvenoj de la Kongreso okazos en la Universitato de Tokio.

Se vi volas iri al Tokio rilatu tuj kun la sidejo de U.E.A.

Granda literatura evento


La kompleta « Dia Komedio » de Dante aperis en nova luksa eldono kiu enhavas, krom la italan originalon, apudmetitan tradukon en la Internacian Lingvon faritan de Giovanni Peterlongo, la famajn ilustraĵojn de Sandro Botticelli kaj antaŭparolojn de la konata itala lingvisto Prof. Bruno Migliorini, de la granda itala artkriitikisto Prof. Piero Bargellini kaj de la elstaraj specialistoj pri Esperanta literaturo, Profesoroj Gaston Waringhien, Francujo (nova prezidanto de la Akademio) kaj Clelia Conterno Guglielminetti, Italujo. Tiu eksterordinara eldono de la serio Oriento-Okcidento estis prezentita okaze de la Universala kongreso en Sofio.

Famekonatan francan brandon **KONJAKO** disvendas s-ano Despeyroux, reprezentanto, 200, rue Fg St-Denis, Paris 10°. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Ekspedo ek de la produkto en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu !

SAMARKAND (fino)

Jam de longe la popola fantazio teksis super tiu-ĉi konstruaĵo legendan kovrilon. Unu el la plej popularaj legendoj ligas la konstruadon de la moskeo kun la plej amata edzino de Timur, BIBI-HANYM, kiu decidis konstrui la moskeon donace al sia edzo, je

postulis, ke ŝi donu la nomon de la kulpinto. Tiam BIBI-HANYM rakontis al la reĝo la veron. Oni ekserĉis la arkitekton, kiun atendis kruela morto. Sed farinte flugilojn li superflugis la preĝoturon for al Meŝhedo... La greneroj de historia vero dronas en la ro-




Tomba monumento de Kusam ibn Abhas

la tempo de lia reveno hejmen, post la milito. Ŝi komisiis la konstruadon de la moskeo al la plej bona kaj sperta arkitekto en la lando. Sed ensorĉita de ŝia beleco, la arkitekto fariĝis la viktimo de freneza kaj senespera amo. Kiam la konstruado de la moskeo estis preskaŭ finita, kaj oni atendis la alvenon de Timur en Samarkandon, la arkitekto diris al BIBI-HANYM, ke li finkonstruos la moskeon nur kondiĉe ke ŝi permesu al li unu kison. La reĝino konsentis ke li kisu ŝin sed tra kuseneto, kiun ŝi metis sur sian vangon. Sed la kiso estis tiom varmega, ke ĝi bruligis la kuseneton kaj sur la delikata vangohaŭto de la belulino restis la postsignoj de liaj lipoj. Kun miro kaj entuziasmo Timur rigardis la belegan, kolosan moskeon, kiun montris al li la reĝino; sed kiam li demetis de sur ŝia vizaĝo la tukon, li ekvidis sur ŝia vango la postsignon de la kiso. La koleriĝinta Timur

mantika fantazio. Fakte oni efektivigis la konstruadon de la moskeo dum la foresto de Timur, kiu tiam troviĝis for de la urbo, militante, sed la ordonon pri la konstruado li mem donis en la jaro 1399, kiam li revenis de Hindio kun riĉa rabajo. Fakte li havis edzinon sed ĝi estis SARAJ - MULK - HANYM, ĥandevenanta maljunulino. Ŝi konstruis, dum la samaj jaroj, medreseon. La konstruado de la moskeo estis komisiita al du korteganoj, kiuj ne diligente plenumis sian devon kaj pro tio estis ekzekutitaj. Kaj ne unu arkitekto laboris sed kolektivo de arkitektoj, majstroj kaj metiistoj, kiujn venigis Timur el la tuta de li konkerita mondo.

Laŭ la vortoj de Klaviĥo, la katedrala moskeo en Samarkand estas unu el la plej luksaj konstruaĵoj de la Timur-epoko. Nun, rigardante tiujn vortojn tra la prismo de la jarcentoj, ni povas plifortigi tiun frazon di-

rante, ke la moskeo apartenas al la plej majestaj kaj luksaj konstruaĵojn, kiuj kiam ajn estis kreitaj en la tuta mezepoka Oriento. Ni rigardis la emalitajn kaj glazuritajn ornamaĵojn, la belecon de la florforma kaj geometria ornamo, gigantajn arabliterajn surskribojn, kies freŝecon ne tuŝis la ĉion nenii-



La kapelo de la Maŭzoleo Gur-Emir

ganta tempo. Ni estis ensorĉitaj... Mi rigardis la horloĝon, kaj rimarkis ke ni mute staris antaŭ la ruinoj pli ol unu horon ne atentante la tempo. Ni forlasis la moskeon, kaj iris laŭ la strato direkte al la ĉefa arkitektura ensemblo de la urbo, al Registan.

Registan troviĝas sufiĉe proksime de la bazaro, preskaŭ ĉe la fino de la iama « malnova urbo ». Jam de malproksime oni vidas ĝiajn preĝturojn kaj majestajn konstruaĵojn, kiuj kvazaŭ regas super la urbo. Registan, la forumo de postmongola Samarkand, ludis la rolon de granda komercplaco al kiu sin direktis ses ĉefaj stratoj de la urbo. Ni iris laŭ unu el ili. Ju pli proksime ni aliradis des pli grandioza montriĝis la trio da majestaj kaj beleagaj konstrrestaĵoj de mezepoko. En la fono staras la medreseo Tilla-Kari, kiu estis konstruita de Jalanguŝ-Bij, en la unua duono de la XVII-a jarcento. Kiel ornamaĵojn, oni aplikis oraĵitajn ornamantojn, kaj pro tio oni ĝin nomis Tilla-Kari, kiu signifas « Orumita ».


Maldekstre de la medreseo Tilla-Kari, staras alia medreseo konstruita de Ulugbek. Nuntempe medreseoj estas konsiderataj spirititaj akademioj de islamo. En la XV-a jarcento, en Registan ilia destino estis tute alia.

La medreseo de Ulugbek estis loko, kie oni instruis ne nur religiajn konojn, sed ankaŭ astronomion, matematikon, liberpensan filozofion de sufizmo. Ulugbek mem kaj la aliaj grandaj scienculoj de lia epoko prelegis pri diversaj temoj.

La medreseo de Ŝir-Dor, kiu staras vid'al vide de la medreseo de Ulugbek estas ĝia spegula kopio, kvankam la arkitekto Abul-Gabbar aliĝis la karakteron de la ornamado farinte diversajn ĉiujn diferencajn desegnaĵojn. Precipe estas originale plenumita la ornamado de fasada arko, kie estas figuritaj homvizaĝaj tigroj atakantaj cervojn. De tiu ornamaĵo devenas la nomo Ŝir-Dor.

Ne sufiĉus gazetospaco por priskribi la ravon, kiu min ĉirkaŭprenis dum nia vizito al la antikva tombejo Ŝaĥi-Zinda, kies maŭzoleojn kaj moskeojn ni rigardis dum preskaŭ du horoj ne lacigante. Sed la tempo nin rapidiĝis. Jam estis la tria posttagmeze kaj ni deziris ĝui ankaŭ la viziton de la plej bela kaj plej bone konserviĝinta historia monumento de timurida epoko, la maŭzoleo Gur-Emir. Tiun maŭzoleon oni konstruis laŭ ordono de Timur por lia nepo kaj heredonto de la trono, Muhamed-Sultan, kiu mortis en la jaro 1405 dum la milito en Turkujo kaj Persujo. Laŭ la intenco de Timur la majesteco de la arkitekturaj formoj devis inspiri la imagon pri la majesteco kaj la kolosa regopovo de la reĝaj personoj enterigitaj en Gur-Emir. Tamen la nevenkebla forto de la artaj rimedoj, la monumenteco de la tuto kaj de la detaloj, difinis la arkitekturan bildon de la monumento. Gur Emir, kiel solena odo orienta parolas per la altspirita lingvo de la arkitekturaj formoj. Tiu monumento, eble kiel neniu alia maŭzoleo en Meza Azio, naskas altajn pensojn pri la majesteco de homa agado kaj senton de rifuzo de bagatela ĉiutageco. Ravitaj, ni rigardis la tombojn de tiuj, kiuj iam ŝancelis la mondon, sur kies konscienco pezas milionoj da senkulpaj viktimoj, maro da sango kaj riveroj da larmoj. Ni eliris el la maŭzoleo kaj ankoraŭfoje ekrigardis la belege luksan kupolon de Gur-Emir. Pasis duono da miljaro sed ne paliĝis la koloroj de la mozaiko, la freŝeco de la ornamo, kaj ŝajnis al ni ke tiu maŭzoleo ne estas historia monumento pri kruelaj regintoj de la pasinto, sed neniam mortigebla, eterna monumento pri la granda arta kulturo de la Uzbeka Popolo.

Petro POLISČUK.



Medreseo Tilla-Kari

ABELKULTURO EN SVISLANDO

(Parolado de S-ro A. BAUR, radio-stacio de Bern,
la 29-an de Junio 1963).

Mi dediĉas mian hodiaŭan elsendon al la Abelbredista Instituto en Liebefeld, plenumante per tio deziron de nia fideĉa aŭskultanto S-ro G. Vidal en Clermont-Ferrand, kiu aparte petis min pri tio. En la abelbredistaj rondoj en la tuta mondo la vorto Liebefeld estas konata, ĉar ĝi estis la unua centro de scienca studado de la apikulturo aŭ abelbredado. Por mi persone Liebefeld signifas la lokon, kie mi loĝas, ĉar Liebefeld estas antaŭurbo de Bern. Tie staras, meze de kampoj, kiuj siaflanke faras oazon en la domaro, la domegoj de la svisa agrikultura eksperimenta instituto, kaj unu etaĝo en la centra domo estas dediĉita al la abelbredado. Mi povus observi la sciencistojn ĉe ilia laboro rekte el mia ĉambro, se ne estus d'stanco de kelcent metroj inter ni. Nun mi iris persone viziti la instituton kaj estis tre afable akceptita de D-ro Hans Wille al kiu mi klarigis mian deziron. Laŭ liaj informoj mi do povas doni jenan resumo pri la abelbredado en Svislando kaj pri la federacia instituto.

Ekzistas en tuta Svislando proksimume 30.000 abelbredistoj, kiuj kune posedas preskaŭ 300.000 abelpopolojn. Evidente la bredistoj estas organizitaj en diversaj privataj asocioj kaj posedas ankaŭ siajn organojn, sed la scienca laboro hodiaŭ estas tiel progresinta kaj komplika, ke la privatuloj jam ne povas okupiĝi pri ĝi; despli valora estas la laboro de la federacia instituto. La abelbredado en Svislando ne estas aparte profitdona, precipe ne en la meza lando, kie la abeloj ne trovas sufiĉe da nutraĵo en la herbejoj; pli interesa ĝi estas en arbaraj regionoj, en la Ĵurao kaj la Alpoj. La rikoltoj de mielo estas kompreneble tre variaj laŭ la jaroj sed ankaŭ laŭ la regionoj. Ĝi povas iri de minimumo de tri kilogramoj po popolo poŝare ĝis 15. En eksterordinariaj kazoj oni jam atingis 70 kg., kaj eĉ 220 kg. La abelbredado en la meza lando ekonomie ne estas interesa, sed tamen neceso pro la fruktoarboj kaj la ŝtato helpas por eviti malprogreson de la abelbredado. La prezo de svisa mielo estas ege alta, 7 ĝis 8 frankojn la kilogramo, dum sur la monda merkato mielo estas havebla sub unu franko. Sed tamen la svisaj abelbredistoj tre facile vendas sian mielon, ĉar ĝi estas tre altkvalita dank'al sia aparta aromo. La svisa popolo estas mielŝatanta, multe pli ol la mediteraneaj popoloj, kiuj konsumas malmulte da mielo. La plej grandaj franduloj ĝe mielo estas la germanoj. En Usono oni tre multe utiligas mielon por sukeraĵoj kaj bakajoj; tie ĝi estas produktata en milfermoj kvazaŭ sur industria bazo je tre malalta prezo en grandegaj kvantoj.

La federacia instituto pri abelbredado estas parto de la federacia eksperimenta instituto por lakto-industrio, kaj ambaŭ kreskiĝis en interesa maniero. Komence, en la fino de la lasta jarcento, la instituto devis studi bakteriologiajn demandojn, kiuj estas tre gravaj kaj por la fromaĝfarado kaj por la abelbredado, ĉar tiuj studoj rilatis al la malsanoj de la abeloj. Sur tiu kampo estis farita tre granda laboro, kiu kreis la famon de Liebefeld ĉar oni tie jam okupiĝis pri tiuj demandoj, kiam en aliaj landoj la abelbredado estis ankoraŭ afero de empirio kaj hazardo. Kiam la laboroj kreskis ankaŭ la instituto pri abelbredado kreskis kaj ĝi fariĝis memstara sekcio, kiu okupas hodiaŭ dudekon da personoj. Oni daŭre okupiĝas pri la malsanoj de la abeloj kaj pli kaj pli tuŝas aliajn kampojn. Tre grava hodiaŭ estas la abelbotaniko, tio estas la esploro de la plantoj interesaj por abeloj. Kaj fine oni nun intensive okupiĝas pri la bredado, tio estas la selekto de popoloj, kiuj donas multe da mielo kaj kiuj povas rezisti la malsanojn. La instituto en Liebefeld estas centro de bredado, de praktika helpo al bredistoj kaj de esploroj. Ĉiu abelbredisto povas sendi abelojn al la instituto por esploro kaj senpage ricevas respondon. Pri epidemiaj malsanoj li eĉ estas leĝe devigata fari tion. Ĉiujare 4 - 5 mil abeloj estas esploritaj kaj ankaŭ cent ĝis ducent ekzempleroj de mielo; tio estas grava por eventuale malkaŝi falsifikitan mielon. Bedaŭrinde la instituto devas pli kaj pli okupiĝi pri mieloj venenigitaj de la ĥemiaj plantprotektiloj hodiaŭ larĝe uzataj. La plej nova agadkampe de la instituto estas la starigo de tri propraj eksperimentaj abelbredejoj, unu en Gerlafingen, Lucerno, unu en Plagne apud Eiel kaj tria en G-bloux en la kantono de Friborgo. Tie oni faras la plej diversajn praktikajn esplorojn kaj precipe ankaŭ okupiĝas pri la selekta bredado. Nova ankaŭ estas la starigo de reto de observantoj pri miel-produkto en arbaro; kaj alia agado estas la organizo de kursoj por abelinspektoroj, kiuj en intervaloj de 1 - 3 jaroj devas viziti ĉiujn abelujojn. Pri la scienca laboro povas eble doni al vi ideon la nombro de la studoj publikigitaj de la membroj de la instituto, nome 72 en tri jaroj. Dank'al sia tradicio kaj plej modernaj aparatoj, la instituto esperas, ke ĝi povos teni la gvidan pozicion, kiun ĝi havas sur la apikultura kampo en la hodiaŭa mondo.

(sendita de S-ro G. Vidal).

N. B. — La kurtonda radio-stacio de Bern sendas senpage sian belan programon al ĉiu demandinto.

Scienco por la gejunuloj

KIO ESTA ATOMO ?

Se vi pistus brikon, kaj poste la briko-polvon, kaj poste la briko-pulvoron kaj tiel plu, venus la momento kiam vi ne plu povus pisti ĝin pli fajna. Tiam vi dispecigis la brikon en multegon da treege malgrandaj elementoj : la atomoj.

Ne estas necese esti scienculo por scii, ke atomo estas nekompakta strukturo de elektronoj gravitantaj ĉirkaŭ nukleo konsistanta el protonoj kaj neŭtronoj. Ni imagas la materion de ĉiuj simplaj korpoj, t.e. la korpoj formitaj el unu sola speco de atomo, kiel la fero kaj la oksigeno, konsistanta el multego da atomoj. Ekzistas tiom da specoj, kiom da simplaj korpoj, t.e. 90, kaj atomo de oksigeno ne pli similas atomon de fero ol Hispano similas Japanon. Sed tiuj diversaj « rasoj » povas geedziĝi inter si por krei aliajn korpojn. Ekzemple, molekulo de akvo entenas 2 atomojn de hidrogeno kaj 1 atomo de oksigeno. La simplaj korpoj kombiniĝante povas konstitui multegon da korpoj, kaj la molekuloj aperas ne kiel « rasoj » sed kiel kombinaĵo de pluraj rasoj, mestizoj. Tiuj 90 specoj de atomoj similas la literoj de la alfabeto : la atomoj formas ĉiujn konatajn korpojn same kiel la literoj formas ĉiujn vortojn de nia lingvo.

Sed ni revenu al ĝia konsisto. Ni diris, ke ĝi konsistas el nukleo ĉirkaŭita de unu aŭ pluraj zonoj de elektronoj, kiuj gravitas. La nukleo konsistas el protonoj kaj neŭtronoj. Antaŭ ne longe oni trovis, ke tiuj protonoj mem konsistas el partikuloj nomitaj « pi-mesonoj ». Do, la atomo similas miniatura sunsistemon, kiu ne estus pli granda ol unu dekmilionono da milimetro. La suno de tiu sistemo, la nukleo estas dekmilfoje pli malgranda ol la tuto de la atomo : ĝia radiuso estas proksimume 1 miliardo da mikronoj. Ĉu vi deziras bildan figuradon ? Imagu la nukleon, kiel globon tiel grandan kiel vi, kaj la elektronojn, kiel pomojn gravitantajn je distanco de dek kilometroj.

Sed, vi diros, ŝajnas, ke la atomo ĉefe konsistas el vakuo ! Jes, fakte. Se vi premus la Eiffel Turo ĝis kompleta senvakuiĝo, vi povus meti ĝin en botelon. Sed la botelo estus kompreneble sampezaj kiel la Eiffel Turo.

Vi certe aŭdis pri la « peza akvo ». Ĉu vi scias kiamaniere oni ĝin « fabrikas » ? La molekuloj de akvo konsistas el du atomoj de hidrogeno kaj unu

atomo de oksigeno. La atomo de hidrogeno estas la malpli peza kaj konsistas el unu protono kaj unuelektrono. Ĉar en atomo la protono disponias la preskaŭ tutan mason, scienculoj havis la ideon aldoni protonon al la atomo de hidrogeno. Ili tiamaniere akiris pli pezan gason havantan la samajn ecojn. Ili nomis ĝin denterium. Farante akvon kun denterium kaj oksigeno ili akiris akvon pli pezan ol la natura, kiun oni utiligas por malvarmigi la atom-piloin.

La atomoj estas ĉiam moviĝantaj. Sed ne samaniere : en feraĵo (solidaĵo) ili nur malmulte moviĝas, ĉar la distancoj inter ili estas malgrandaj. Sed la atomoj de hidrargo-guto (likvidaĵo) estas pli liberaj kaj moviĝemaj, ĉar ili estas pli malproksimaj unu de la aliaj. La atomoj de hidrogeno (gaso) forpuŝas unu la alian kaj kolizias la parion de la ujo. Tiu senorda movo kreas la premon de la gaso.

La atomoj ne estas moderna eltrovaĵo. Kvincent jarojn antaŭ nia erao la greka filosofo Leucippe jam konsideris, ke ĉiu aĵo estas farita el multego da treege malgrandaj partikuloj kaj lia disĉiplo Demokrito nomis ilin « atomoj », vorto kiu signifas « kiu ne povas esti distraciita ». Dudek jarcentojn pli poste oni verŝajne multe parolis pri ili en la « salonoj » ĉar rolulino en unu el la teatraĵoj de Moliere diras, ke ŝi « sufiĉe ŝatas la malgrandajn korpojn ». En 1808 la granda kemiisto Dalton malfermis por la atomo la pordojn de la Scienco. « Kiam mi pretigas mian kafon, verŝajne diris Dalton al si, mi povas meti en la lakton pli malpli da kafe ; la miksaĵo estos pli malpli malhela sed ĝi ĉiam estos lakto-kafo. Sed se mi deziras fabriki karbonan gason mi devas bruligi precize 12 gramojn da karbono en 32 gramo da oksigeno ; se mi metas pli da oksigeno aŭ karbono, la pliaĵo restos neuzita. Tio signifas la partikuloj de karbono kombiniĝas kun la partikuloj de oksigeno laŭ fiksaĵoj proporciaj. Ni supozu ke ekzistas treege malgrandaj partikuloj de ĉiu korpo kaj ĉiuj identaj, kaj ni revivigu sub nia moderna formo la nedivideblan atomon de la antikvuloj. »

Kaj en 1896 Henri Becquerel, franca fizikisto, malkovris la radioaktivecon de la uranio. Pierre kaj Marie Curie izolis la poloniumon kaj radiumon. De tiu tempo multaj scienculoj okupiĝis pri la atomo, kiu fariĝis promeso de feliĉo... aŭ de malperdo por la homoj.



GRAVAJ



Antaŭ 70 jaroj mortis apud Parizo.


Charles GOUNOD. Ricevinte la Rom-premion de la Pariza Konservatorio, li unue estis direktoro de religia muziko. Pli poste li interesis pri nereligia muziko, ĉefe pri opero. Li ricevis sian plej grandan sukceson kun « Faust » ankaŭ konata sub la titolo « Margarete ». Ankaŭ fama estas lia « Ave Maria », medito laŭ preludo de J.S. Bach.



Antaŭ 125 jaroj naskiĝis en Parizo.

Georges BIZET. Li kreis pli ol 75 operoj el kiuj « Carmen » kaj « La Perloĉasistoj », ricevis plej grandan sukceson. Liaj verkaĵoj ne estis favore akceptitaj de la publiko ĉe la komenco. Eĉ « Carmen » estis tre malvarme akceptita. Li mortis en sia 37-a jaro, ne konante la triumfon, kiun poste renkontis liaj verkoj.

DATREVENOJ



Antaŭ 150 jaroj naskiĝis en Parno.

Giuseppe VERDI. Li estas unu el la plej famaj komponistoj. De tre simpla deveno, li komencis sian muzik-karieron, kiel orkestrestro en sia naskiĝurbo. Poste li fariĝis deputito ĉe la Itala Cambro. Liaj operoj « Rigoletto », « Aida », « Othello », « Falstaff », alportis al li tutmondan famecon.

IOM DA HISTORIO

Granda nomo el la Loire-Valo

Tomas pri la antikva franca familio « de Talleyrand-Perigord » kies bieno, la kastelo de Valençay, estas unu el la plej vizitindaj kasteloj de la Loire-Valo.

De la 10-a jarcento oni retrovas postsignojn de tiu familio kiam « Boso » estis grafo de la « Marche ». Lia filo Aldebert fariĝis grafo de Perigordo en 1066, sed estas « Helie », kiu antaŭ sia morto en 1205 aldonis al la patra nomo, tiu de « Talleyrand ».

Post la forpaso de la unuenskita branĉo de la familio, la provinco Perigord eniris la reĝan bienon, sed, tamen, la dua branĉo konservis la familian nomon, kun aliaj posedaĵoj : la graflando de « Chalais » en Francio, kaj tiu de « Sagan » en Silezio. La bieno de Valençay estis aĉetita nur en 1803 kaj starigita kiel dukojo en 1827.

La plej famekonata membro de tiu familio estis la nobelbarko duko de Valençay : Karlo, Maŭrico de Talleyrand-Perigord (1674-1838) kiu ludis imponan rolon en la franca historio. Unue li estis pastro pli pro familia oportuno ol pro alvokiteco. Nomita episkopo en Autun en 1789 ĵus ĉe la komenco de la granda franca Revolucio, li fariĝis deputito en la nova Asembleo, « Les États Généraux », sed dum la Teroro li prudente forkuris kaj trankvile vivis en Britio kaj Usono. Intertempe, li forlasis sacerdotecon kaj poste edziĝis. Kiam ŝanĝiĝis la politika etoso, li revenis Francion, kie, de 1797 ĝis 1807, ni plurfoje retrovas lin ministro pri eksterlandaj aferoj, kaj ĉiama ruza, sagaca diplomato.

Rekompence, Napoleono la Unua donis al li la princlandon de Bénévent en Italio, sed de 1807, antaŭvidinte ruinigon de l'Imperiestro, Talleyrand, denove prudenta, sin detenis de politika agado. Tamen, en sia kastelo de Valençay, ŝanĝiginta en princa malliberejo, li, de 1808 ĝis 1812, akceptis la hispanan reĝan familian antaŭe detronigita de Napoleono.

Kiam, siavice, la franca imperiestro estis forpelita, Talleyrand ne timis partopreni la restaŭradon de la franca reĝo Ludoviko la 18-a, kaj li rolis, kiel subtila traktanto en la kongreso de Vieno por ke Francio ne estu dispecigita de la venkintoj. Peste li estis ambasadoro en Londono kaj helpis al la sendependeco de Belgio.

Dum tiu periodo, ĉar Talleyrand estis repudiinta sian junan, belan sed ne tre inteligentan edzinon, lia nepino rolis apud li kiel maŝtrumentino, kaj partoprenis la honoradojn en la kortego. Tiu nepino, konata sub titolo « Dukino de Dino » estis heredantino de « Courlande », vasta princlando ĉe la bordo de la Balta Maro, kaj vasalo de Pollando anksita de Rusujo en 1795. La dukino de Dino restadis kun sia onklo ĝis lia morto.

De post tiu tempo la kastelo de Valençay apartenas al nepaj posteuloj de Talleyrand. Malfermita por la publiko, ĝi atestas per riĉa meblaro, pri iama riĉeco de posedanto, pri iama eŭropa historio.

B. CHEVERRY.

FAVORE AL ESPERANTO

— Kun subskribo de Profesoroj André Cailleux (Sorbono) kaj Jean Tricart (Fakultato de Scienco, Strasburgo) aperis en la « Revuo de Dinamika Geomorfologio » artikolo favora al Esperanto el kiu ni ĉerpas la jenajn liniojn :

« Ĉu ne estus pli oportune por ili (la sciencistoj) uzi sian tempon por propraj esploroj ol por provi memorteni la rusan, la anglan, la germanan kaj baldaŭ la ĉinan tradukon de la vorto « deklivo » ?

« Ĉio estus tiel simpla se la sciencistoj el ĉiuj landoj havus unu nuran lingvon, se ĉiuj iliaj artikoloj estus akompanataj de traduko en komunan lingvon ? Sed kiun lingvon ? La ekzistantaj naturaj lingvoj estas ofte tre malfacilaj ; kaj la adopto de unu el ili vekos ofendigemon de la parolantoj de la aliaj lingvoj. Artefarita lingvo kiel Esperanto ne renkontos tiajn malhelpaĵojn. ... Al tio la sciencisto povas aldoni alian argumenton : Esperanto ebligas la aŭtomatan enkondukon de la novaj vortoj, sen iu ajn el tiuj problemoj de tradukado, tiel delikataj kiam temas pri la enkonduko de tiuj vortoj en ekzistantan naturan lingvon. »

El la Kultur-Domo

KIO OKAZIS EN GRESILLON ?

La du grandaj periodoj estas ĉiusomere la Kulturaj Internaciaj Semajnoj tradicie okazantaj en Julio kaj la Someraj Semajnoj okazantaj en Aŭgusto. En 1963 tiuj du periodoj renkontis tiel grandan sukceson kiel kutime.

La 14-a de Julio alvenis en la Kastelon gesamideanoj el diversaj landoj. Ek de la lundo 15-a de Julio komenciĝis la prelegoj. S-ro Roose el Brugge parolis pri « La Spirito de la Renesanco » kaj pri sia urbo. S-ino Major el Londono pri siaj spertoj en neesperantistaj internaciaj kongresoj kaj kiel instruistino de Esperanto en Skandinavio. S-ino Roux el Saumur pri « La suno, fonto de vivo », kaj « Kristnaskaj kantoj ». S-ino Cheverry el Angers pri sia regiono. Dum tiu periodo okazis kurso por komencantoj gvidata de F-ino Vazon.

Kompreneble la partoprenantoj ne nur la-boris. Ili ankaŭ multe ekskursis al la Loire-kasteloj, al la Zoologia Ĝardeno le « Tertre Rouge » kaj al la nokta spektaklo en la kastelo de Le Lude. Ili ankaŭ amuziĝis okaze de la vesperaj kluboj. Ĉu plaĉis al ili la restado kaj la aktivajtoj? Jesan respondon ricevis la organizintoj la lastan vesperon, kiam ĉiuj diris sian kontenton kaj sian deziron reveni por retrovi la amikecan Crezijonan etoson.

La 11-a de Aŭgusto komenciĝis aliaspekta periodo. Pli nombraj estis la gejunuloj, plejparte francaj la gepartoprenantoj kaj fakte pli familia la etoso. Multaj personoj venis por eklerni la internacian lingvon aŭ plulerni ĝin. Tri kursoj diversgradaj okazis ĉiumatene kaj komuna konversacio antaŭ la vespermanĝo. Posttagmeze funkciis kursoj de bindado de libroj kaj de korbifarado, kiuj estis plensukcesaj. Kia plezuro kunporti hejmen korbon kiun oni mem faris aŭ libron kiun oni mem bindis ! Kvankam la vetero ne estis tute somera la banejo ricevis multajn vizitantojn kaj okazis surakvaj lud-konkursoj. Alia evento multe ŝatata estis la aŭto-konkurso. Ĉojo, studado, ple-

na programo, kiu kontentigis ĉiujn, kaj la sukceso de la finaj ekzamenoj pruvis, ke granda poresperanta laboro estis farita.

Ankaŭ tri aliaj periodoj okazis. Komence de Julio S-ro Moulin gvidis kursojn kun partopreno de eksterlandanoj. Fine de Julio S-ro Ribot gvidis superan kurson celantan al la preparado de la Atesto pri Kapableco. Komence de Septembro S-ro Bourdelon gvidis kurson organizitan de la Franca Unuiĝo.

Ĉu la Esperantista Kulturdomo plenumis sian oficon? Certe jes, kaj tia estas la opinio ne nur de la organizantoj sed ankaŭ de la vizitantoj. La periodoj estas sufiĉe diversaj por ke ĉiu trovi, kion li deziras trovi. Fruktodona laboro estis farita per kaj por Esperanto. Se ni konsideras, ke dum la Paskaj ferioj sesdek estontaj instruistoj vizitis Gresillon, ke dum la printempo okazis pluraj unu-du tagaj renkontiĝoj, ke neesperantistoj konatiĝis kun Esperanto okaze de neesperantistaj kunvenoj en la kastelo, ni konstatas ke ankaŭ ĉi-tiun jaron la celo estis trafita. Dank'al malavara donaco la kuirejo estas nun moderna, la akvo-distribuo kaj la hejtado plibonigitaj, kelkaj riparoj estos baldaŭ faritaj kaj kelkaj novaj ĉambroj aldonitaj.

La fideluloj, kiuj ĉiujare aŭ ĉiun duan jaron revenas al Gresillon povas vidi la progreson fari-tan de la unuaj pioniraj jaroj. Tiuj progresoj estis eblaj ne nur dank'al la laboro de la respondeculoj sed ankaŭ dank'al la fideleco de tiuj vizitantoj, kiuj, per sia regula ĉeesto montras, ke ili tute aprobas nian laboron.

Tre baldaŭ estos preta la programo de la 1964-a jaro. Survoje al Hago aŭ al Narbono venu aŭ revenu al Gresillon. Partoprenu la aktivajn. Neniu bedaŭris sian ĉeeston. Vi certe ne bedaŭros vian.

FANTAZIAJO

NOVA TEATRAJETO

CE LA DENTISTO

Sceno : la laborejo de dentisto.

Roluloj : Dentisto, Sinjorino, Avo.

(Dentisto sidas, legante gazeton. En la mano li tenas dentpinĉilon. Iu frapas je la pordo).

Dent. : Eniru, mi petas. (Sinjorino enkondukas Avon, kadukan maljunulon, kies buŝo estas ĉirkaŭvindita per skarpo.) Kiel mi povas vin servi?

Sinj. : La avo havas dentdoloron. Vi devas eltiri du dentojn.

Dent. : Sidigu lin ĉi tie, mi petas. Unue mi devas kloroformi lin. (La sinjorino prenas la gazeton, sidigas, kaj ne pli atentigas la farojn de la dentisto. La dentisto verŝas iom da kloroformo sur pecon de ĉarpio, kaj anestezas la pacienton. Li komencas eltiri dentojn, kiujn li jettas en apudan sitelon. La ludanto devas kaŝi dekdu blankajn ŝtonetojn en sia mano por ĉi tiu artifiko. Dum li jetadas, li kalkulas). Unu ! Kom longe liaj dentoj doloris?

Sinj. : (Ankoraŭ legante). Dum 6 monatoj.

Dent. : Ĉu vere ? (Li returnas sin al la avo). Ĉu vi diris 2 ?

Sinj. : Ne, 6.

Dent. : Du ! Tri ! Kvar ! Kvin ! Ĉu vi loĝas proksime de ĉi tie ?

Sinj. : Ne, mi devis veturi 12 mejlojn.

Dent. : Ĉu vere ? Ĉu vi diris 6 ?

Sinj. : Ne, 12.

Dent. : Ses ! Sep ! Ok ! Naŭ ! Dek ! Dek unu ! Kiun aĝon havas via avo ?

Sinj. : 94 jarojn li havas.

Dent. : Ĉu vere ? Ĉu vi diras 12 ?

Sinj. : Ne, 94.

Dent. : Dek du ! (Li serĉas en la buŝo de la avo). 94 ! Sed li havas nur 12 !

Sinj. : 12 kiojn ?

Dent. : 12 dentojn, kompreneble.

Sinj. : Mi parolis pri lia aĝo. Ne gravas, tamen. Kiom kostas tio ?

Dent. : 18 ŝilingojn, mi petas. (Li revindas la skarpon ĉirkaŭ la buŝo de la avo. La sinjorino prenas monerojn el sia monujo, kaj kalkulas dum ŝi donas ilin en la manon de la dentisto).

Sinj. : Unu, du. Ĉu vi estas dentisto de longa tempo ?

Dent. : De 7 jaroj.

Sinj. : 7, vere ? Sep, ok. Ĉu estas multaj dentistoj en ĉi tiu urbo ?

Dent. : Proksimume 16.

Sinj. : 16, ĉu vere ? Dek ses, dek sep. Vi loĝas ĉe numero 30, ĉu ne ?

Dent. : Ne, numero 26.

Sinj. : 26, ĉu vere ? Dudek ses, dudek sep...

Dent. : Haltu ! Vi pagis 9 ŝilingojn tro multe. (Li redonas la monerojn, kalkulante.) Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok. Mi ne havas sufiĉe. Ha ! Eble tiu sinjoro volos helpi min. (Al la avo.) Ĉu vi komplezus prunti al mi unu ŝilingon ? (La avo, nenion dirante, donas la petitan moneron, kaj la dentisto transdonas ĝin al la sinjorino). Naŭ ! Multan dankon ! (Li kondukas la avon al la pordo). Se la doloro revenos mi servos lin senpage. Bonan tagon !

Sinj. : Vi estas tro afabla. Bonan tagon ! (La dentisto sidiĝas, kaj rekomencas legi la gazeton).


Kurteno.

R. MACKAY.

« NIA SINJORINO » DE PARIZO

Dum la somero estis prezentita ĉi-vespere en Parizo, antaŭ « Nia Sinjorino » teatraĵon, kiu elvokis la ok cent-jarojn de la ekzisto de la katedralo.

Spektaklo « Sono kaj Lumo », ĝi estis imagita de Louis Merlin laŭ teksto de J.-F. Noël, kaj estis ludata de la plej famaj francaj aktoroj : Madeleine Renaud, François Perrier, Pierre Fresnay, Suzanne Flon, Jean Marchat, Pierre Brasseur, J.-L. Barraud.



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Ni denove memorigas al vi la ĉefajn punktojn de la regularo de nia konkurso :

1) En ĉiu numero aperonta de « Kulturaj Kajeroj » vi trovos du problemojn, ĉu enigmojn, ĉu krucvortojn, ĉu tekstojn korektotajn aŭ kompletigitajn. La reĝustigitajn tekstojn aŭ la respondojn la konkursantoj sendu al :

Sro P. Chevalier, 19 boulevard G.-Lauriol
Nantes (L.-A.) - Francujo

antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la revuo (ekz. antaŭ la fino de Novembro por tiu-ĉi numero, antaŭ la fino de Januaro 1964 por la sekvanta, ktp.)

2) Kun la respondo (almenaŭ la unua) vi bonvole sendu la banderolon de la gazeto, kiel atestilon de abono.

3) La du gajnintoj de la antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni la ĉiaran konkurson.

4) La premioj konsistas el : a) 15-taga senpaga restado en Gresillon ; b) 8-taga senpaga restado en Gresillon.

5) Se pluraj konkursantoj ricevos la saman nombron da poentoj, la premioj estos lotitaj inter ili.

6) La « Amuzaj Problemoj » prezentitaj antaŭ sur la distra paĝo estas apartaj de la konkurso. Ne respondu ilin.

1-a problemo :

El la 5 subaj frazoj kelkaj estas korektaj aliaj nekorektaj. Bonvolu korekti la nekorektajn (po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita) sed atentu ne « korekti » la korektajn (estos forprenita po 1 poento por ĉiu malĝusta korekto).

1. — Oni neniam povos kiel internacia lingvo elekti ian alian lingvon ol Esperanto.

2. — Ni ne dezirus multe da aferoj kun pasio, sed ni perfekte konus, kion ni deziras.

3. — La maristoj vestitaj per flava vaks-tolo antaŭenkondukis la ŝalupon per laŭtaktaj batoj de siaj grandaj remiloj.

4. — La feliĉo alvenas guto post guto, la malfeliĉo laŭ ondoj.

5. — La domo montris sian fasadon taptitan de vinberujo inter du turetoj similaj al estingiloj.

2-a problemo (10 poentoj)

En la subaj frazoj bonvolu anstataŭigi la punktojn per la korektaj vortoj :

1 — Avertu lin, ke li ... gardu.

2 — Li ... laboris, ke li estas malsana.

3 — Kiu ne timas morton, ne ... minacojn.

4 — Jen io, ... definitive solvas la demandon.

5 — Kiu ... rompas, tiu pagas.

Al ĉiuj ni deziras bonan kuraĝon kaj bonŝancon !

AMUZAJ PROBLEMOJ

SOLVO DE LA LASTA PROBLEMO :
« LA ŜIPPEREULOJ »

Aritmetika solvo : La 30 ŝippereuloj konsumas dum 50 tagoj :

$$50 \times 30 = 1\,500 \text{ porciojn.}$$

Tiuj porcioj estas tiuj, kiujn ne konsumas la homoj de la ŝipo dum 10 tagoj ($60 - 50 = 10$)

Nombro de la homoj antaŭ la renkonto de la ŝippereuloj :

$$1\,500 : 10 = 150.$$

Algebra solvo : Estu x la nombro de la homoj sur la ŝipo, kiuj konsumas : $(x + 30) \cdot 50$ porciojn.

$$60x = (x + 30) \times 50$$

$$60x = 50x + 1\,500$$

$$10x = 1\,500$$

$$x = 150$$

Respondo : 150 homoj.

Kontrolo : $150 \times 60 = 180 \times 50$

$$9\,000 = 9\,000$$

NOVA PROBLEMO


Kiom aĝaj ni estas ? : Se vi multiplikas mian aĝon per mia aĝo je mia edziĝtago kaj dekalkulas la aĝon de mia edzino multiplikita per ŝia aĝo je nia geedziĝtago kaj poste aldonas la diferencon inter ŝia nuna aĝo multiplikita per mia aĝo je mia edziĝtago kaj mia nuna aĝo multiplikita per ŝia aĝo je nia geedziĝtago, la rezulto estas 553. Kiom aĝaj ni estas ?

GRAMATIKO PER... BONHUMORO


« ... Sed ĝenerale mi tenas min je la sekvanta principo : mi vidis lin **grandan** = mi vidis lin, kiu estis granda (aŭ kiam li estis granda) ; mi vidis lin **granda** = mi vidis, ke li estas granda... »

(Lingvaj Respondoj — Letero al S. Meyer - 1906) .

— O — O — O —



— Oni montris al mi la plej rektan vojon al la maro.
Sed mi ne trovas ĝin la plej mallonga.



— Mi ne plu volas vidi tiel malbonajn notojn.
— Tion mi jam diris al la profesoro ; sed li konsideras mian rimarkon neatentinda.



— Mia edzo opinis la jarlaboron tro laciga. Li povos nun ĝui mallacigan libertempon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Valentin Kibalčič, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Kómenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).


Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezojn per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por ekterni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo